Jaro 1910-1911. — No 1-2. Septembro-Oktobro 1910.

# BULTENO de
# ★ LIBERA PENSO ★

**Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj**

Sekretario-kasisto : R. Deshays, Sens, Francujo. Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

## LIBERA PENSO
### INTERNACIA SOCIETO ESPERANTISTA DE LIBERPENSULOJ

### Societa Regularo

1. — La internacia Societo Libera Penso celas :

1-e, Helpi la liberan esprimon kaj komunikadon del ideoj pri ĉiu teoria kaj praktika temo, defendi tiun liberecon kontraŭ ĉiu ajn premado kaj malrespekto, kaj organizi universalan liberpensan opiniantaron inter la eminentuloj kaj en la popoloj mem ;

2-e, Plifaciligi la taskon del aliaj liberpensaj societoj kaj federacioj propagadante inter ili la scion kaj uzadon de Esperanto.

Ĝi malpermesas al si alpreni oficiale ian solvon de la diversaj problemoj, kies liberan diskutadon ĝi starigos en si mem kaj ebligos, laŭ sia povo, inter la tuta homaro.

2. — La ĉefaj rimedoj por la agado de la societo estas :

Publikigi en bulteno dokumentojn pri la liberpensa movado, senpere senditajn de ĉiunaciaj korespondantoj ;

Eldoni esperantan tradukon de la precipaj verkoj rilataj al ĝia celo kaj verkojn originalajn en Esperanto ;

Klopodi per privataj aŭ publikaj paroladoj, per opaj postuloj aŭ personaj influoj kontraŭ ĉiuj baroj kaj privilegioj malhelpantaj la liberecon del penso ;

Fondi regionajn Grupojn por doni sciigojn pri universala liberpenso, ekzemplon de spirita sendependo kaj reciproka respekto, subtenon al personoj persekutataj pro esprimo de opinio.

3. — Ĉiu persono deziranta kunlabori por la tasko difinita en la unua artikolo povas partopreni en la Societo.

La peton por akcepto oni povas sendi ĉu al la Centra Komitato, ĉu, se Grupo ekzistas en la loko, al la Komitato de tiu Grupo.

Societano, kiu pruvite agis kontraŭ la celo de la Societo, povas esti eksigata de la Komitato mem, kiu lin alprenis, sed nur estinte ebligata doni siajn buŝajn aŭ skribajn klarigojn.

4. Ĉiu societano pagas ĉiujare kotizon po 1 spesmilo (2,50 fr. ; 2 mark. ; 2 ŝil. ; 0,50 dol. ; 1 rublo ; 2,40 kron. ; 1,20 hol. flor. ; 1 jen).

La societa jaro komenciĝas je la ordinara ĝenerala kunveno.

5. — Membroj donaculoj estas la personoj, kiuj pagas ĉiujaran kotizon 10 sm.

Ĉiu povas anstataŭigi sian kotizon per unu sola pago dudekobla, kiu rajtigas por la jenaj titoloj : 20 sm., ĉiama membro ; 200 sm., ĉiama donaculo.

6. — La titolon honora membro povas doni la Centra Komitato aŭ la ĝenerala kunveno al personoj, kiuj faris grandan servon al la Societo. De tiuj membroj nenia kotizo estas postulebla.

7. — La Societo petadas kaj danke akceptas ĉiujn donacojn, kiuj povas helpi ĝian agadon.

8. — Ĉiu kotizo ne pagita dum la unua jarkvarono estas enspezata per la poŝto, kaj la prokrastinto devas pagi la poŝtajn kostojn. Se tiu ĉi ne pagis, la Centra aŭ Loka Komitato povas proklami lin eksiĝinta.

9. — La enpreso de la kotizoj kaj donacoj en la plej proksima numero de la bulteno taŭgas kiel kvitianco.

10. — La Societo estas administrata de Centra Komitato, balotita por tri jaroj en la ĝenerala kunveno ordinara.

La Komitato renoviĝas po unu triono ĉiujare. La elirintaj membroj estas reelekteblaj.

11. — La Komitato balotas sian estraron, kiu estas ankaŭ la estraro de la Societo.

12. — Ĉiujare la Societo havas ĝeneralan kunvenon, kies loko kaj tempo kiel eble koincidas kun tiuj ĉu de Universala Kongreso de Esperanto, ĉu de Kongreso de la Internacia Federacio de la Libera Penso.

13. — La Ĝenerala Kunveno ordinara ricevas la raporton kaj ĉiujn komunikojn de la Komitato, aprobas la kontojn,

kaj diskutas pri la demandoj rilataj al la funkciado de la Societo.

Ĝi balotas la komitatanojn per sekreta voĉdono, kaj laŭ la plimulto de la esprimitaj voĉoj.

La voĉdono per letero estas permesata.

14. — Krom tio la Societo povas esti kunvokata por ĝenerala kunveno eksterordinara, ĉu per la iniciato de la Centra Komitato, ĉu laŭ skriba peto de almenaŭ 50 societanoj, post skriba aprobo de la plimulto.

15. — Loka Grupo devas enhavi almenaŭ 10 membrojn.

16. — La Lokaj Grupoj estas tute sendependaj, tiel de la Societo, kiel unu de alia.

La fonda regularo de ĉiu Grupo devas enhavi la 1-an artikolon de tiu ĉi regularo, sen ia kondiĉo kontraŭa. La Grupoj transdonas al la Societo la kotizojn de siaj membroj, kaj organizas laŭvole sian propran budĝeton.

17. — Ŝanĝoj en tiu fonda regularo povas esti farataj nur per skriba voĉdono post konsiliĝo en Ĝenerala Konveno.

18. — En okazo de finiĝo de la Societo, ĝia havo, kun la havo de la Lokaj Grupoj, estos donacata al la Internacia Federacio de la Libera Penso, aŭ, se ĝi ne plu ekzistas, al ia Societo simila.

# NIA BULTENO

—o—

Jen kreskintan organon plezure prezentas la Societo LIBERA PENSO al siaj membroj, al la nialingva gazetaro, al ĉiuj esperantistoj kaj liberpensuloj en la mondo. Nun pli granda amplekso ebligos klare distingi en nia bulteno malsemajn partojn sub la jenaj titoloj : 1e La Ideoj, por filozofiaj temoj diskutotaj kun plej liberama toleremo ; tiajn artikolojn oni sendu al komitatan Schubert. 2e La liberpensa Batalo, por informoj pri ĵusaj okazintaĵoj rilataj al persekuto, malcedo, batoj aŭ sukcesoj de la defendantoj de la esprimlibereco en ĉiu lando kaj partio ; tiun parton redaktos Ges-roj O. Bünemann, espereble per komunikoj de ĉiulandaj anoj. 3e La Societo, por niaj administraj kaj propagandaj aferoj. Ankaŭ interŝanĝo de anoncoj etendos nian agadon.

La presigon zorgas komitatano Schoofs en Antwerpen. Helpu ĉiu nian kreskon, por la venko de Esperanto kaj de la Penso Libera !

# Al la Liberpensaj Societoj

## Raporto pri Esperanto

La jenan raporton en franca lingvo ni sendis al la Komisiono organizonta Konsiliĝon de l'naciaj asocioj por la Universala L. P. Kongreso 1912 en München. Ni insiste petas niajn anojn (krom la franclingvaj), ke ili traduku ĝin kaj sendu al siaj naciaj L.P. gazetoj kaj lokaj societoj aŭ ĵurnaloj. Ili bonvolu nin informi pri la plenumo de tiu tasko.

——o——

La Internacia Esperantista Liberpensa Societo LIBERA PENSO, aliĝinta al la Internacia Federacio de la Libera Penso :

Konsiderante, ke la internacia helpa lingvo Esperanto ĉiutage en ĉiuj landoj grande progresas kaj povas efike helpi la liberpensan movadon ; ke aliparte estas utile interesigi la esperantistaron pri niaj ideoj kaj nia agado.

Konsiderante la multajn kaj gravajn maloportunaĵojn, kiujn alportas la diverseco de la lingvoj al la diskutoj de l'internaciaj kunvenoj kaj al la korespondado kun la societoj de ĉiu nacio.

Konsiderante, ke la uzo de Esperanto povas tuj doni netakseblan helpon al la internaciaj asocioj pro ĝia facileco, precizeco kaj fleksebleco, provitaj per praktikado de dudekjaraj tre diversaj aplikoj kaj ses universalaj kongresoj.

Prezentas denove al la Kongreso la proponon, kiu ne povis esti diskutata ĉe la kongreso en Prago (1907) pro manko de tempo :

1e Alpreni la internacian lingvon Esperanto kiel helpan lingvon oficialan en la diskutoj de l'internaciaj kongresoj de la Libera Penso.

2e Alpreni la uzadon des Esperanto por la korespondo de l'konstanta oficejo de la Internacia Federacio de la Libera Penso kaj en ĝia jarlibro.

Por faciligi la aplikon de la dua deziro, la Esperantista Societo Libera Penso komunikos al la sekretariejo de la Federacio liston de korespondantoj en ĉiuj landoj tradukontaj de sia nacia lingvo en Esperanton kaj reciproke ĉiujn leterojn kaj dokumentojn por la Konstanta Oficejo.

Tia estas, Karaj Kamaradoj, la propono, kiun ni submetis al la Internacia Federacio de la Libera Penso kunveninta plenkunside merkredon 24 an de Aŭgusto en Bruselo. Ĉio esperigis al ni la sukceson : la urĝeco de l'demando, la malfruiĝoj kaj malfacilaĵoj tro evidentaj, kiujn ĵus alportis al la kongresaj laboroj la diverseco de la lingvoj, fine la favora akcepto ricevita de la esperantista delegito, kiam, eldirinte en Esperanto je la malferma kunsido la saluton de la societo al la ĉeestantaro kaj ĝian respektesprimon al Ferrer, li estis en franca lingvo peteginta la liberpensulojn ekkapti la novan armilon, kies povon niaj kontraŭuloj jam komprenis kaj utiligis (Universala Katolika Kongreso en Parizo, Paske 1910 ; 3 katolikaj revuoj en Esperanto).

Se la decido estis prokrastata, tio estas pro la malregula interveno de iu ĉeestanto, kiu ne devis paroladi, unue tial ke li estis delegita de nenia societo kaj sekve neniel rajtis partopreni la administran kunsidon je la merkredo, poste tial, ke li ne estas senpartia en la disputo, estante mem aŭtoro de projekto de internacia lingvo, fine tial, ke li translokigis la demandon, diskutante la teorian perfektecon de la lingvo, dum la temo estis pri ĝia tuja kaj praktika utileco, kiu estas fakto. Ekzistas ĉirkaŭe 1500 esperantistaj grupoj, 106 revuoj naciaj kaj profesiaj en Esperanto, kaj biblioteko enhavanta proksimume 1400 verkojn ĉiuspecaj.

Sed ni opinias, Kamaradoj, ke ni ne devas bedaŭri tiun prokraston : ne nur ĝi ne estas enterigo de nia propono, sed ĝi ebligas al ni vin dokumentigi kaj pligrandigos la efikon de decido, kiun vi estos prenintaj post universala kaj pripensita konsiliĝo.

Ni ne insistos pri la servoj de lingvo sufiĉe preciza, por esti alprenita de sciencistoj kiel Berthelot, patroninta la Sciencan Revuon je ĝia naskiĝo, De Saussure, kiu ankoraŭ estas ĝia direktoro, Sebert, Bouchard, Huntington, Boirac, kiuj publikigis sciencajn verkojn en Esperanto ; precipe kiam tiu lingvo samtempe estas sufiĉe facila, por esti instruata al malkleruloj. Ĝi ebligos al ĉiuj niaj batalantoj ne nur tiun proksimuman komprenadon, tiun duonan uzon, kiun oni tro ofte rimarkas pri la fremdaj lingvoj en Kongresoj, sed senperan komunikon plenan kaj propramovan de la fluanta parolo, de la penso mem je naskiĝa stato, kia ĝi sin prezentas, viva kaj sincera, en frataj konfidencioj de familia konversacio. Pri la publika parolado, ĉar estas en Esperanto nek esceptoj nek malfacilecoj, oni estas certa, tie neniam esti malkorekta kaj ridinda.

Pri Esperantista Societo de Libera Penso, jen ĝiaj meritoj por via bonvola atento. Unue ĝi estas unu el tiuj, kiuj estas mone kvitaj kun la Federacio, eĉ malgraŭ malfacila situacio : ĉar ĝi postulas jare nur Fr. 2.50 kiel kotizaĵon kaj liveras al siaj membroj monatan bultenon. Ĝi havas proksimume 150 membrojn, reprezentantajn 20 diversajn naciojn. Novembre je lasta jaro, por honori la martiron, kies agadon kaj memoron ni ĵus gloris kaj kiu estis unu el niaj unuaj anoj, la Societo eldonis en broŝuro kun franca kaj esperanta teksto la pledon diritan por Ferrer ĉe la militkonsilantaro, de kapitano Galceran. Ĝi publikigas en la bulteno verkon de nia amiko Niemojewski, konfiskita en Polujo de la cenzuristaro, la Kateĥismon de l'Liberpensuloj. Ĝi atendas por grandigi sian ĵurnalon kaj pliintensigi sian agadon nur aliĝon de niaj amikoj ĉiulandaj, kiuj, antaŭpravigante la sankcion de la venonta kongreso, nepre deziros ne lasi akapari unufoje plu de l'defendantoj de l'estinto eltrovon, kiun la scienco kaj la konscienco modernaj liveris por la universala liberigo.

Ni plezure nin prezentas je la dispono de ĉiuj Liberpensuloj por pluaj informoj kaj por SENPAGAJ KURSOJ DE ESPERANTO PER KORESPONDO, kaj en la naciaj liberpensaj gazetoj.

La sekretario de la Societo LIBERA PENSO
R. Deshays, Sens, Francujo.

# LA KOMITATO
## por la societa jaro 1910-1911.

—:—

Prezidanto : S-ro O. Bünemann, Eidelstedterweg, 121 a/3, Hamburg 31.

Vicprezidanto : S-ro D-ro A. Batek, Pl zen, Bohemujo.

Sekretario-kasisto : S-ro R. Deshays, Sens, Francujo.

Redaktoroj de bulteno : La Ideoj : S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington ; La liberpensa batalo : Ges. Bünemann. Presigo : S-ro F. Schoofs, 45, Kleine Beerstr., Antwerpen, Belg.

Komitatanoj : F-ino Helen Fryer, 20, Calais gate Camberwell park, London S. E. ; S-ro A. Guillemin, Chalet Esperanto, Houilles (Seine & Oise) Francujo.

LE KUNVENO DE LIBERA PENSO ĈE LA SESA

Ĝi estis plej interesa interparolado de liberpensemaj kongresanoj, sed ne kunsido de nia societo. S-ro Schubert skribas, ke li tre esperas varbi multajn amerikanojn, kiam oni povos prezenti al ili vere valoran organon. Nu, la nuna reorganizo de la bulteno estas jam, kiel ni esperas, unua paŝo en tiun direkton.

LA VOĈDONO POR RENOVIGO DE LA KOMITATO

Ĝin partoprenis 50 societanoj. Elektiĝis S-roj Schubert per 48 voĉoj, Schoofs 49, Deshays 50 kiel komitatanoj ; kaj kiel rezervaj S-roj Wolf 47, Fridrich 48.

**HONORMEMBRO :** S-ro J. Dons, 155, rue St-Bernard, St-Gilles-Bruxelles.

Ni jam diris en la raporto pri la L. P. Kongreso, kiel sindona kaj efektive favora al nia Esperantista Societo montriĝis tiu plej agema veterano de la belga liberpenso.

**Andrzej Niemojewski**

# KATEĤISMO DE LIBERPENSULO
**Tradukis Frank Sandecki**

(Daŭrigo)

Andrzej Niemojewski, la fama pola liberpensulo kies verkon ni publikigas, senĉese suferas konfiskojn kaj procesojn pro episkopaj denuncoj. Lian lastan verkon « Dio Jezuo », konfiskitan de la rusa cenzuro, germane eldonos la librejo Huber Frères en Winterthur. (Svisujo).

D. Kaj kion instruas eklezio ?

R. La instruado de eklezio kondukas al ekstrema pesimismo. La homoj kreitaj de Dio laŭ lia formo kaj simileco, jam en unua generacio ŝtelas kaj mensogas, en dua jam reciproke sin mortigas, poste tiel malsuprenfalas, ke Dio devas ilin ĉiujn ekdronigi. Li restigas la plej bonajn, por ke ili multiĝu, tamen estas ankoraŭ pli malbone. Do li sendas al ili sian Filon, por ke li enkonduku ilin sur la vojon de vero. Dume ili tiun-ĉi lian filon pendigis. Do li preparis al ili inferon por ke en ĝi ili estu bakataj jarcentojn de jarcentojn.

D. Kiel vi nomus la teran potenculon, kiu kondamnus milionojn da homoj je la brulado ?

R. Mi nomus lin kruelulo aŭ frenezulo.

D. Do kio estus tia Dio, kvazaŭ la plej mizerikorda, la idealo de bono ?

R. Fabelo, elpensita de pastraro por restigi malsaĝajn homojn en eterna timo kaj trompi ilin per espero de di graco ; se ili obeos al pastroj.

D. Ĉu ne estas bela aĵo la dio graco ?

R. Mi estas homo libera kaj mi bezonas nenies gracon. Se Dio ordonus al mi genufleksi antaŭ li, li estus fierulo. Fierulo faras lin ĉiu katolika katehismo, dirante ke Dio kreis mondon por pligranda sia gloro.

D. Do Dio ne kreis la mondon ?

R. Nur ni homoj, havantaj nian komencon kaj finon al ĉio la Saman komencon kaj finon naive alskribas. La mondo havas nek finon, nek komencon. Ekzistas nur konstanta kunmetiĝo kaj dismetiĝo de diversaj elementoj. La scienco esploras tion, porxkoni kian potencon posedas homo en la tutmondo kaj kiel al li helpi por trapasi la vivon kiel eble maldanĝere kaj feliĉe.

D. Do kio vi estas ?

R. Parteto de eterna mondo.

D. Kio konvinkas pri ĝia eterneco?

R. Maldifektemaj ĝiaj elementoj.

D. Ĉu vi ne timas morton ?

R. Mi timis antaŭe. Ĉi-tiun timon donis al mi naturo, por ke mi defendu mian vivon. Hodiaŭ mi liberigis min de ĝi, ĉar la batalilon de timo mi anstataŭis per la batalilo de scienco.

D. Sekve vi mortos ?

R. Mi mortos, kiam estos elĉerpita mia organismo. kaj ĝi ne povos pli adapti sin al la kondiĉoj de estado.

D. Vi diras tion tiel trankvile ?

R. Ĉar la prudenta homo ne lasos trompi sin per iaj timoj. Mi restos eterne en naturo, disĵetita en atomojn. Mi eliris el naturo kaj mi revenos al naturo.

D. Do vi tuta vivas tere ?

R. Pri la tereco povas opinii mia intelekto. Ĉion ekster la tereco mi lasas al naturo.

D. Kio do anstataŭas al vi la eklezion ?

R. La lernejo.

D. Kion ĝi donas al vi ?

R. La sciencon.

D. Kaj kion vi ŝuldas al ĝi reciproke ?

R. Zorgi pri tio, ke ĝi ĉiam estu sendependa.

(La fino aperos en la proksima numero).

## LA SOCIETO

### NOVAJ ALIĜOJ

Liberiga Stelo en Sens, ĉe la Kooperativa societo, Francujo.

Sekcio de la « Ligue des Droits de l'Homme », Sens, Franc.

Laborista Esperanta Grupo, S° F. Zuckarolli, B/Strohhause 31/e III, Hamburg 5, Germanujo.

S-ro Jan Jacobs, Boomsche steenweg, 444, Antwerpen.

S-ino Olga Ptacnikova, Turnow 441, Bohemujo.

S-ro Selimir Machiela, Kod. A. Lecevica, 7 via del Municipio Rijeka (Fiume), Aŭstrio.

S-ro Julien Chevalier, 243 Vestingstr., Berchem-Antwerpen, Belgujo.

Eksigitaj : S-roj Danihelovsky, Delaroue, Felser, Mihich, Mikoch, Ŝmeic.

Entute 135 membroj.

### Kaso Septembro-Oktobro

Enspezoj :

| | | |
|---|---|---|
| | Reportite | 36.10 |
| Kotizaĵoj de | Maranhão | 4.90 |
| | Raczi | 2.40 |
| | Van Gansen | 2.50 |
| | Ges. O. Bünemann | 5.10 |
| | Laborista Gr. Hamburg | 2.40 |
| | Ptacnikova | 2.40 |
| | Machiela | 2.40 |
| | Schreyer 1910-11 | 5.00 |
| | Vendo de broŝuroj Pledo p. F. | 0.70 |
| | Vendo de propagandaj kartoj | 2.30 |
| | Sume | 66.20 |

Elspezoj :

| | |
|---|---|
| Paperoj kaj kovertoj | 2.65 |
| Sendo de l'Aŭgusta bulteno | 10.90 |
| Poŝtmarkoj | 2.00 |
| Preso de la julia bulteno | 18.10 |
| Sendo de broŝuroj kaj kartoj | 0.80 |
| Sume | 34.45 |

Enkaso Fr. 31.75 (Sm 12.58).

Ŝuldo por preso de l'aŭg. bulteno Fr. 21 (Sm 8.36).

Ŝuldo al S-ro O.B. Fr. 5 (Sm 2).


Estas malfermita por 1911 jaro abono de la gazeto

**“ LA ONDO DE ESPERANTO ”**

(laŭ la adreso : 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Jara abonpago 2 rubl. (2,120 sm.)

Dum la 3-a jaro de sia ekzistado tin ĉi sola ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 16-paĝaj numeroj la librojn :

1) A. RIVIER. EN RUSUJO PER ESPERANTO.

(130-paĝa originala priskribo de peresperanta vojaĝo de la Alĝera aŭtoro en Rusujo).

2) V. DEVJATNIN. PLENA VERKARO.

3-a **vol.** 140 paĝe libro.

Apartaj kajeroj de la ĵurn. 15 sd., de la verko de Rivier 64 sd., Devjatnin 65 sd.



Presejo Esperantista ; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.



JARO 1910-1911. — N° 3-4. NOVEMBRO-DECEMBRO 1910


# BULTENO de ★ LIBERA PENSO ★


Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

SEKRETARIO-KASISTO DE LA SOCIETO : R. DESHAYS, SENS, FRANCUJO.
ADMINISTREJO DE LA BULTENO : KL. BEERSTR., 45, ANTWERPEN.

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)


## LEV NIKOLAJEVIĈ TOLSTOJ

Mortis nia honora membro Lev Nikolajeviĉ Tolstoj en la aĝo de 82 jaroj. La gazetoj kaj revuoj de ĉiuj landoj parolas pri li kaj citas liajn verkojn : sed ni, la internaciaj liberpensuloj, havas specialan kaŭzon, malĝoji pri lia morto, ĉerpi el la ekzemplo de lia agema vivo instruon kaj esperon por la estonto.

En la vastega rusa imperio, kie ne estas loko por libera pensado, por sinceremo : kies nura nomo jam vekas en ni indignon pro hontindaj okazaĵoj, malbenindaj agoj de perforto kontraŭ la konscio ; tiu giganto Tolstoj senlace bataladis kontraŭ maljusto, kontraŭ forto kaj gajnis per sia energia militado kaj per sia sinceremo tian potencon, ke la fortega rusa registaro, kiu sentis sin forte ĝenata de lia laboro, ne povis kuraĝi, sendi lin en Siberujon aŭ alimaniere mutigi lin.

La fideleco de Tolstoj al la laŭbibliaj principoj de l'kristanismo, lia naiva kredo kaj konfido je dio certe ne akordiĝas kun la konvinkoj de la plejmultaj el niaj anoj kaj legantoj ; sed, kiel por ni mem ni postulas pensliberecon, ni ĝin konsentas al ĉiu ajn, kaj se la pensoj de Tolstoj ne iris la saman vojon, kian niaj, ni serĉas la motivon por tio en la specialaj sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, en kiuj li vivis, kaj en la influoj, al kiuj estis submetita lia cerbo dum la juneco, kiam la impresoj tiom forte enradikiĝas.

La idealaj de Tolstoj estis interhoma frateco, justo kaj vero, kaj ni estimegas ĉiujn, kiuj sincere kaj tolereme alcelas ilin, ĉu ili estas religiuloj aŭ ne. Niaj solaj malamikoj estas la indiferentuloj kaj la malsinceruloj, kaj ili estis ankaŭ la malamikoj de nia granda Tolstoj.

Kontraŭ la mensogo, kontraŭ la memiluziiĝo batalas la verkoj de Tolstoj. Antaŭ nelonge ankoraŭ ni legis en la « Internacia Socia Revuo », la ĵurnalo de niaj amikoj, lian fortan paroladon kontraŭ la milito. En la jaro 1908 aperis lia energia publika letero « Mi ne povas silenti » (Nje mogŭ molĉatj) kontraŭ la mortpuno. Nia vegetara societo espereble baldaŭ konigos al la esperantistaro la konsekvenceman libron pri « Kruelaj ĝuoj ». La granda romano « Anna Karénina » pentras la belan, sinceran familian vivon kaj pligrandigas nian malamon al la mensogoj de l'monduma vivado. La mirinda libro « Sonato Kreŭcer » (Krejcerova sonata) montras senindulge la falson de l'nuna situacio de la virinoj, la mensogojn de niaj interseksaj rilatoj, kiaj ili estas ĝeneralaj en ŝtatoj, kie laŭdire regas la monogamio, la kristanaj principoj de l'ĉasteco.

Ni honoru lian memoron, batalante kiel li por la vero, por la libereco, por la sinceremo ; kontraŭ la indiferentuloj kaj la malamikoj de tiuj idealoj !

O. B.

# RELIGIO KAJ LIBERA PENSO.

Iu leganto eble diros ke la titolo devas esti « Religio kontraŭ Libera Penso », sed, ho ne, la temo estas Religio kaj Libera Penso.

Tre ofte aŭdiĝas la aserto ke la homaro ne povas ekzisti sen religio, sed, demandiĝas kio, fakte, estas religio. Pri la signifo de la vorto « religio » la pensularo tute ne interkonsentas, ĉar la eminenta ekleziulo Augustinas devenigis la vorton de « religare » t.e. re- ligare = ree ligi ion ; tiu devenigo signifas la ligilo inter homo kaj Dio.

Cicero asertas ke la vorto « religio » devenas de religere, samsignifa je relegere, t.e. ree legi, ripeti, pripensi, kio estas samsignifa je koncepti la devojn de homo al lia proksimulo, la devojn de homo al la homaro. En tiu senco ĉiu ajn liberpensulo estas religiema homo ; lia amo al Dio estas amo al homo, amo al la homaro. Ĉe li la moraldogmo estas la plej digna kaj plej nobla kiu limigas la memecajn emojn kaj akcelas la bonfarton de la tuthomaro. Tiu ĉi moraldogmo do tute ne estis donita al homaro kiel ekdonaco, sed estas la rezultato de kelkjarcenta barakto kaj estis survenkita per la armoj (armiloj de l'spirito), dum la alicelanoj, la alipensuloj, ĉiam povis uzi la monduman povforton. Kristanismo estas donaco dediĉita de Romo al tuthomaro.

Jen kelkaj vortoj pri Libera Penso. Pensi libere estas unu el la plej malfacilaj taskoj por la homa spirito. De eksteraj impresoj jam de la plej antaŭa juneco oni estas jam tiom dependa de tio kion nia instruistoj kaj edukistoj lernigis al ni. Sendia aŭ senpia la kredanoj nomas la liberpensulon pro tio ke li riskas ektuŝi la sanktaĵojn per forta mano kaj ekzameni ĝin kun helpo de la mikroskopo. Tra centjaroj, tra miljaroj la homaro vivaĉis en duonlumo. Kristanismo, plej antaŭe, estis religio de la malriĉuloj kaj de la mizeruloj; sed de tiam, kiam Konstantino Granda venkis je la nomo de la kruco, li starigis la solregadon, tiu ĉi kristanismo fariĝis ŝtatreligio, fariĝis malhelpigilo al memstara pensado, la interna nobla kerno pereis sub pompoza eksteraĵo, la dogmo de la ekleziularo fariĝis ĉefaĵo, t.e. la « netuŝebla fundamento ». Kiu ajn riskis, esprimi dubojn pri la « Diodonitaj sanktaj » libroj, kaj iamaniere memstare pensis, aŭ nur penadis memstare pensi, tiu certe suferis persekuton.

La noblulon Jesuo oni signomarkis neebla Dio kaj Savinto, kiu estis tute nenecesa, malpleje tio tute ne estis sukcesa, ĉar la homaro ĝis hodiaŭa estas samgrade bona kaj samgrade malbona kiel antaŭe. Se la Dipatro kreis la homon kun la iloj fari pekojn, tio estis sendube kruela, ĉar laŭ Dia ĉiopovo li certe antaŭe sciis ke la kreitaro faros pekojn. Unu dogmo kontraŭstaris la alian.

El la dogmo de amo, dank'al la regavida ekleziularo, elkreski dogmo de malamo, religio de persekuto de ĉiuj ajn pensuloj kiuj riskis mempensi. La imperiestro Nero ĵetigis la kristanojn al la sovaĝaj bestoj, kaj la pia Filipo IIa kaj aliaj finbruligis ilin sur sennombraj ŝtiparejoj.

Tamen la torĉo de la eterna vero dumtempe ombriĝas sed neniam estingiĝas. De jarcento al jarcento ekzistis kuraĝuloj, kiuj je la nomo de l'vero fordonis sian vivon, pli kaj pli la ombroj de stupida ĉiokreduleco malaperis antaŭ la ekbrilo de la nova tempo kaj ni epigonoj povas elĝui la venkon de la vero. Unu altaĵo post la alia devualiĝas antaŭ la ravata okulo de la scivolulo.

Arda, tre arda estas la barakto inter kredo kaj sciado, sed la armoj de la lasta estas nekontraŭstareblaj kaj ili survenkos la mallumon de la spirito por la profito kaj por la ĝuado de venontaj generacioj.

La Jesuo de la malriĉuloj surportis dornkronon, en nia koro li vivas en tuta sia indeco kaj mildeco. De tago al tago la moderna socio krucumas lin denove. Li travivis kaj trasuferis tion kion li denove travivus kaj trasuferus je la manoj de l'nuntempa ekleziularo se li revenus ĉi-teren ! Por tio, t.e. sen kredo, vi liberpensuloj gardu en via koro la plej belegan kaj la plej veran religion de amo al la homaro; la vera amo al homo plenigos vin kaj karakterizos vin per via agado, via pensado kaj via vivado. Por la bono kaj bonfarto de la homaro ni sentime marŝos antaŭen !

B. Schubert.

## El la poemo de Lukreco

(Lucretius, la jarcento antaŭ J. C.)

PRI NATURO DE L'AĴOJ.

*Poezio helpu sciencon !*

Iru nun, konu la reston kaj ĝin aŭdu pli klare.
Mi ja scias, ke tio estas malluma, sed akre
Pikis mian koron granda espero de gloro,
Kaj samtempe, brusten enbatis dolĉegan amadon
Por la Muzoj : pro tiu instingo, kun penso fortika
Mi trapaŝas senvojan Muzlandon, neniam antaŭe
Piedpremitan ; mi ĝojas, al virgaj fontoj alveni
Kaj elĉerpi ; mi ĝojas deŝiri novan floraron,
Kaj por mia kapo elserĉi la kronon al tie,
Kie nenies frunton plifrue la Muzoj ornamis
Ĉar mi unue instruas pri grandaj aferoj, penante
Por malligi la streĉajn ŝnurojn de l'Religioj,
Kaj pri temo malklara mi verkas tiel lumigajn
Versojn, ŝmirante ĉion per la muza gracio.
. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Do disrompu la timon de l'homoj kaj la mallumon
Ne la radioj de l'suno, ne sagoj helegaj de l'tago,
Sed la vido de l'naturo, kaj la racio !

(Ŝomverse tradukis R. Deshays).

## PENSOJ DE MAETERLINCK

Ĉio, kion oni faras dum la tago, ŝajnas malpli impona ol plej eta gesta skizata je la noktiĝo, sed homo estas naskita por labori dum la tago, ne por sin agiti en mallumo.

Kredi, ne kredi, tio ne estas tre grava : grava estas la lojaleco, la amplekso, la senprofitemo kaj la profundeco de l'motivoj pro kiuj oni kredas aŭ pro kiuj oni ne kredas.

Estas ia humileco, kiun oni devas meti inter la parazitajn virtojn, kun la senfrukta memofero, la arbitra ĉasteco, la blinda forlasemo, la malluma submetiĝo, la pentemo kaj tiom da aliaj, kiuj tiel longe deturnis por dormanta marĉo, ĉirkaŭ kiu ĉiuj niaj memoroj ankoraŭ vagadas, la vivajn akvojn de la homa moralo.

Malsanema virto estas ofte malutila pli ol bonfara malvirto; certe ja ĝi pli fortiras de la vero, kaj estas nenio esperebla for de l'vero.

Oni ofte estas maljusta kontraŭ la elreviĝoj. Oni donas al ili ĉagrenan, palan, senkuraĝigitan vizaĝon ; kontraŭe ili estas unuaj ridetoj de la vero.

(Tradukis R. D.)

## LIBERPENSA KRONIKO

Dum la monato novembro 1910- a la liberpensa societo « Germana Monisma Unuiĝo » okazigis en Hamburgo tre efikajn paroladojn pri la forigo de la religia instruo el la lernejoj. La lasta parolinto, Prof-ro Gurlitt aldonis al sia parolado tre insistajn admonojn, ke oni eksiĝu oficiale el la ekleziaj organizaĵoj.

### ALVOKO.

La anoj de Libera Penso estas insiste petataj, sendi raportojn pri la okazaĵoj en sia regiono, kiuj rilatas al nia afero. Ankaŭ trafaj artikoloj kaj precipe tradukaĵoj de gravaj ĵurnaloj estas ĉiam dezirataj. Se ne tuj estas loko por ili, ili servos por malpli frua bulteno. Ĉiu kunlaboru laŭforte !

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn kaj artikolojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington Usono.

Andrzej Niemojewski

## KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

**Tradukis Frank Sandecki**

(Daŭrigo)

D. Ĉu la lernejo povas esti dependa ?

R. Domaĝe, ĝi estas ankoraŭ dependa ĝis nun.

D. Kial ?

R. Ĉar la decidaj sferoj volas per la helpo de lernejo edukadi la tipon de dependaj homoj.

D. Por kio tio estas al ili bezona ?

R. Por ilia profito. La pastroj kiuj ĉiam subtenas interesojn de riĉuloj kaj potenculoj volas meti sian manon sur la lernejon. Ĉiuj tiuj sferoj rekomendas ke aliaj principoj estu instruataj en universitatoj, aliaj en mezaj lernejoj kaj aliaj en popolaj lernejetoj.

D. Kiamaniere la socio povas sin defendi ?

R. Per la fondado de tiel nomitaj popolaj universitatoj, popolaj por ĉiuj. La publiko, koninte tie la veron, postulos tiam la reformon de regnaj lernejoj kaj instruadon liberigitan de ĉiuj flankaj celoj.

D. Kion celas sendependo scienco kaj kia estas ĝia socia signifo ?

R. Ĝi celas ke la homo ŝanĝu sian vidpukton pri la mondo el teologia rigardo en la sciencan rigardon.

D. Kaj kio estas la teologia rigardo en la mondon ?

R. Laŭ tiu rigardo la mondo estis kreita de Dio ; li ankaŭ aranĝis diversajn klasojn kaj la celo de l'homo estas meriti la gracon de ĉielo kaj savon en ĉielo. La homo do devas blinde obei al la eklezio kaj ĉiujn malfeliĉaĵojn opinii justa dia allaso.

D. Kaj kio estas scienca rigardo en la mondon ?

R. El la eterne kreanta sino de l'naturo aperis la homaro, formiĝis socioj kaj sociaj konstruoj. Ĉiuj-ĉi aranĝoj ĝis ia tempo estis konformaj al ĝeneralaj bezonoj, sed alvenas la tempo de necesaj ŝanĝoj, kiam la homoj klarigas al si tion.

D. Kio sekvas de tŭs-ĉi rigardo ?

R. Ke la homaro estas al si mem celo kaj pri si mem devu decidi.

D. Kia signalo elaperas de tio-ĉi ?

R. La signalo de l'homaro sendependa.

---

D. Multfoje mi aŭdas el via buŝo tiajn vortojn kiel etiko, moraleco, bono kaj malbono. Kio do estas la moraleco ?

R. Moraleco estas ia maniero de agado.

D. Ĉu vi konas iajn moralajn verojn ?

R. Rilate al tio-ĉi estas granda konfuzo de ideoj. Oni instruas : ne mortigu, ne ŝtelu, ne adultu kaj samtempe konsilas militarismon, toleras borsajn trompaĵojn kaj devigas malriĉajn knabinojn ke ili perlaboru la panon per prostituado.

D. Sekve ĉiuj niaj principoj devas de nove esti esplorataj ?

R. Jes.

D. Kiamaniere vi agus pri tio-ĉi ?

R. Ni devas serĉi la vojojn por ni plej bonajn sur la tero, kaj vojojn, kiujn nia konscio tiam vidos kiel la plej konvenajn, akcepti moralaj. Ĉion, kio restos taŭga al kulturado de libera kaj feliĉa homo, ni nomos bono, kaj ĉion, kio baras, ni nomos malbono.

D. Sed via konscio ĉiam ja ŝanĝiĝas kaj perfektiĝas ?

R. Jes. Sekve ĉiu bono kaj malbono estas kondiĉa kaj devas recevi senĉesan aliiĝon. Kio estas bona hieraŭ, estas malbona hodiaŭ. Tial ĉiu moraleco ekrigidigita, malnova, malŝanĝema estas tio, kontraŭ kio protestas nia prudento sur la principo de evidenta sperto. Iam la supro de moraleco de malforta homo estis subigi sin al volo de Dio, aŭ al volo de sorto, tio signifas alfari sin al tiu volo. Hodiaŭ, kiam homo fariĝis pliforta, li baraktas kun sorto kaj iafoje venkas ĝin. La sorto sendadas al li infektojn, li tamen scias difekti ilin per la helpo de medicino.

D. Jes, se li estas riĉa. Sed se li estas malriĉa ?

R. Ne devas esti malriĉaj homoj. Homo malriĉa estas sklavo. Riĉulo kiu toleras apud si malpuraĵon, mizeron, malsanojn estas senzorga blindulo, ĉar li ne scias, ke malsano povas elrampi nerimarkite ĝis lia propra hejmo kaj la mizero povas krei anarĥion, kiu ruinigos lian havaĵon.

D. Ĉu do la riĉaj homoj devas dividi sian havaon kunĵ malriĉuloj ? Ĉu sufiĉos por tio-ĉi la havaĵoj ?

R. Neniu postulas de ili tion-ĉi. Ili estas tro malriĉaj por ke ili povu nutri ĉiujn malriĉulojn kaj vesti ĉiujn nudojn. Sed ili ne fermu la sciencon al popola amaso kaj la scienco armos homojn al laboro kaj al tia produktado, ke en estontaj sociaj ordoj ne estos tiuj malfeliĉoj.

D. Sekve kun kiu signalo vi aperas ?

R. Kun signalo de sendependaj sociaj ordoj.

D. Kian socian ordon vi nomas sendependa ?

R. Tian, kiu estas formata per volo kaj per bezono de tuta socia aro, sed ne de la unuaj aŭ de iaj klasoj.

D. Do vi postulas la leĝojn por la popolo kaj vi kredas, ke la popolo pli bone regos ol estroj ?

R. Al mi ne sufiĉas politikaj leĝoj, ĉar la popola povas administri eĉ pli malbone ol estroj, se ĝi ne estos pli edukita ol ili. Postulante do politikajn leĝojn, mi postulas samtempe la plej grandan instruadon por la popolaj amasoj, por ke ili per la mano de malklereco mem ne enmetu trancilon en la koron.

D. Sekve eble estus pli bone atendi ĝis la popolo estos klerigita ?

R. Unu estas ekzakte ligita kun alia. Batalante pri la leĝo mi sciiĝas kaj en sekvo de jena sciiĝo mi batalas pro la leĝo. Nenia birdo flugos super sin, kaj nenia popolo elbatalos al si pli grandajn leĝojn ol ĝia konscio. Sed kiam la popolo eltiras manojn al instruado, al kulturo, aperos ĉiam iu, kiu tiras ĝin je la maniko kaj malhelpas.

D. Kian penson ĉi-tio al vi alŝovas.

R. Ke la homa iniciativo devas esti sendependa.

D. Sed kio gardos sendependan homan iniciativon de eraroj ?

R. Ties konstanta kaj publika kritiko. Sekve iru en mondon kaj alportu al homoj la novaĵon de libera penso, de libera homo, de libera scienco, de libera lernejo, de sendependaj ordoj kaj antaŭ ĉio de sendependa iniciativo.

FINO.

## LA SOCIETO

NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Schlatt Istvan, Var. 21, Vesprem, Hungarujo.

S-ro Josef Tomlianoviĉ, Zentralwerkstätte, Serajevo, Bosnio.

S-ro C. V. Soare, Fund. Vladsianu, 4, Bukureŝto, Rumanujo.

S-ro Heriberto Diaz Lopez, Calle X Nr 5, Santa Cruz de Tenerife, Kanarioj, Hispanujo.

S-ro Bohumil Libal, Hrochuv Tynec, Bohemujo.

S-ro Davovin Devĉic, Gospic, Kroatujo.

S-ro A. Lecat, profesoro, rue de Metz, 10, Dijon, Francujo.

S-ro Trinidad Soriano, Castellar, 30, Sevilla, Hispanujo.

Mortis : L. Tolstoj.

Eksiĝis : Raftopulos, Globus.

Entute : 143.

**DEZIRAS KORESPONDI** kun liberpensuloj fremdlandaj: H.S-ro SHAW, Leabrooks Engineering Works, Near Alfreton, Derbyshire. (Anglujo).

Liberpensulojn nepre interesos INTERNACIA SOCIA REVUO, monata Esperanta gazeto. Redakcio ĉe S-ro J. L. BRUIJN, Weimarstraat, 22, Hago (Nederlando). Abonprezo : jare 1.40 Sm; duonjare 0.80 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

LA INICILO MATEMATIKA (Ludo de kubetoj kunigeblaj) de Jacques CAMESCASSE. Librejo Hachette, 79, Boulevard St-Germain, Paris. Prezo : kun Esperanta broŝuro fr. 12. (Sm 4.75).

Ni ne miras, ke tiu bonega edukilo, konforma al la metodo de nia eminenta societano Laisant, estas elpensita de alia societano : ni gratulas kaj dankas S-ron Camescasse ; ekzameninte tiun amuzigan lernigilon, utiligeblan je ĉia aĝo, ni estas certaj ke por kalkuligi niajn filojn, ĝi multe pli taŭgas, ol rozario. R. D.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Eliranda inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato

— La Plej Malnova el Ĉiuj Gazetoj Esperantistaj —

Fondita en 1895

La Plej Enhavoriĉa ! 48 PAĜOJ da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.

La Plej Malkara ! 5 FR. (2 Sm.) Abonprezo por UNU JARO

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacèpéde, Paris.

Estas malfermita por 1911 jaro abono de la gazeto

"LA ONDO DE ESPERANTO"

(laŭ la adreso : 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Jara abonpago 2 rubl. (2,120 sm.)

Dum la 3-a jaro de sia ekzistado tiu ĉi sola ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj senpage donos al siaj abonantoj, krom **12** 16-paĝaj numeroj la librojn : .

1) A. RIVIER. EN RUSUJO PER ESPERANTO.

(130-paĝa originala priskribo de peresperanta vojaĝo de la Alĝera aŭtoro en Rusujo).

2) V. DEVJATNIN. PLENA VERKARO.

3-a **vol.** 140 paĝa libro.

Apartaj kajeroj de la ĵurn. 15 sd., de la verko de Rivier 64 sd., Devjatnin 65 sd.

Presejo Esperantista ; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

Jaro 1910-1911. — No 56. Januaro-Februaro 1911.

# BULTENO de ★ LIBERA PENSO ★

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

Sekretario kasisto de la Societo : R. DESHAYS, Sens. Francujo.

Administrejo de la Bulteno : Kl. Beerstr., 45, Antwerpen.

Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

## El "La esenco de la religio"

de Ludwig Feuerbach. (1804 1872).

La fakto, ke racio, almenaŭ en certaj vivsferoj, senribele kuniĝas kun la plej terura superstiĉo, ke politika libereco kuniĝas kun religia sklavemo, ke natursciencaj, industriaj progresoj kuniĝas kun religia reakciemo, eĉ kun bigoteco, donis al multaj personoj la suprajan konvinkon, ke la religio ne tuŝas la vivon, precipe la publikan, politikan vivon. La sola afero, kiun oni devus alceli, estas nepra libereco por ĉiu, kredi, kion oni ŝatas kredi.

Sed mi respondas al tio, ke tiaj ŝtatoj, laŭ kiuj politika libereco kuniĝas kun religia mallibereco, ne estas veraj. Mi tute ne povus paroli pri politika libereco, se mi men estus sklavo de miaj religiaj imagaĵoj kaj antaŭjuĝoj.

Vera libereceo ekzistas nur tie, kie la homo venkis siajn religiajn antaŭjuĝojn kaj imagaĵojn.

La celo de la ŝtato ne povas esti iu alia, ol eduki veremajn, perfektajn homojn — « perfektajn » tamen ne laŭ fantazia senco. — Do : ŝtato, kies anoj, malgraŭ liberaj politikaj institucioj, estas religie malliberaj, ne povas esti vere humana kaj libera ŝtato. La ŝtato ne faras la homojn, sed la homoj la ŝtaton. Kiaj la homoj, tia la ŝtato. Kompreneble, en ŝtato jam ekzistanta ĉiuj homoj, kiuj per naskiĝo aŭ enmigrado fariĝis membroj de ĝi, devas subiĝi al la kondiĉoj de l'ŝtato ; sed malgraŭ la nombro de l'nove aniĝantaj homoj, la ŝtato estas nenio alia ol la sumo kaj la grupiĝo de la jam ekzistantaj homoj, kiuj par institucioj kreitaj kaj organizitaj de ili difinas la pozicion de l'rilate malgranda nombro de enmigrintoj kaj novnaskitoj.

Do : tie, kie la homoj estas politike liberaj, sed religie malliberaj, ankaŭ la ŝtato ankoraŭ ne estas perfekta.

Koncerne je la dua punkto, la kred- kaj konsciencilibereco, certe la unua kondiĉo de libera ŝtato estas, ke « ĉiu fariĝu beata laŭ sia propra ideo » (vidu malsupre klarigon) ke ĉiu kredu tion, kio plaĉas al ĝi. Sed tiu ĉi libereco estas tute sensignifa, tute senenhava, ĉar ĝi estas nenio alia ol la libereco, ke ĉiu laŭplace kondutu kiel frenezulo.

Tamen la ŝtato laŭ nia ĝisnuma senco agas plej saĝe, ne tuŝante la teritorion de l'kredo, donante nepran liberecon en tiu ĉi rilato. Sed la tasko de l'homo en la ŝtato estas, ne nur kredi, kion ĝi ŝatas kredi, sed kredi, kio estas racia, aŭ pli bone, ne nur kredi, sed ankaŭ scii, kion ĝi devas kaj povas scii, se ĝi volas esti libera kaj klera homo.

Oni ne doni ĉi tie la pretekston, ke ekzistas limo por la homa scio ! Certe, en la naturo ekzistas ankoraŭ multaj aĵoj, kiujn ni ankoraŭ ne povas klarigi ; sed la mistikaĵojn de la religio, kiuj naskiĝis en la homoj mem, almenaŭ estas facile klarigeblaj por la homoj. Kaj pro tio, ke ili povas klarigi tiujn mistikaĵojn, ili malkrovu ilin ! —

Fine estas tute erara kaj de la historio, eĉ de la ĝenerala vivo ĉiutage refutata opinio, ke la religio ne havas influon sur la publikan vivon. Tiu opinio naskiĝis el nia epoko, en kiu la kredo ne estas plu vera en la homo, tiam ĝi ne havas plu praktikajn sekvojn, tiam ĝi ne plu naskas mondhistoriajn agojn. Sed tie, kie la kredo ne estas plu io alia ol mensogo, la homo troviĝas en tre malbona pozicio kontraŭ si men, tie la kredo almenaŭ havas tre malbonajn sekvojn por la moralo.

Kaj tia mensogo estas la moderna kredo je dio. Do : la ĉesigo al tiu ĉi mensago estas kondiĉo al nova, sana, agema homaro.

El germana lingvo tradukis

ELISABETH BÜNEMANN.

") Diro de l'reĝo Frederiko la Granda de Prusujo. (1740-1786.

## Esperanto kaj Libera Penso.

Hispanlingva traduko de la cirkulero de « Libera Penso » aperis en la Madrida ĵurnalo « Espana Nueva », kaj en la ĉiusemajna gazeto « Las Dominicales », organo de la Internacia Federacio de Liberpensuloj en Hispanujo, Portugalujo kaj Ameriko. Tiu ĉi kuraĝa malnova kunbatalanto, al kiu tiom multe ŝuldas la libera penso, aldonas kiel komentarion al la dirita cirkulero :

La antaŭaj linioj honoras eksterordinare la Societon « Libera Penso », ĉar ĝi vidiĝas varmegan kaj sindonan fervoron, tiel por disvastigi tutmondan lingvon, kiu estu komuna ligilo inter ĉiuj homoj de la terglobo, kiel por propagandi la helan kaj saviĝan idealon, kiun celas la Internacia Libera Penso.

Tiuj eraras, kiuj konsideras Esperanton kiel malsaĝaĵon. Ĝi respondas al nepra bezono de la kosmopolitismo kaj tutmonda komercado de nia epoko. Same kiel sin altrudis la metra sistemo por ke ni havu komunan mezurilon, tiel sin altrudas komuna lingvo. El tio devenas la klopodoj de homoj studemaj kaj bonaj, por elpensi tutmondan lingvon, inter kiuj venkis la aŭtoro de Esperanto.

La utilo de la elpensaĵo estas videbla ; jam miloj da homoj apartenantaj al ĉiuj landoj kaj rasoj sin komprenas por utilaj interrilatoj dank'al Esperanto, kaj tio estus al ili tute neebla sen tiu perilo ; ĉar la nura laboro, lerni vivantan lingvon kun ĝia grandega varieco de formoj vortaj kaj sintaksaj, postulas jarojn da laboro ; tiom pli, lerni ilin ĉiujn por komuniki kun germanoj, angloj, rusoj ĥinoj, k.t.p. Kontraŭe, Esperanton oni lernas dum malmulte da tempo.

Fine la estraroj devigos ke la infanoj lernu Esperanton ĉe la lernejoj, kiel ili lernas la metran sistemon, donante al ili per tiu interkomunikilo, trezoron de moralaj kaj materiaj bienoj netaksebIe valoran, ĉar ili tiel povos vivi en sia patrujo, kunigitaj kun la tuta Homaro.

Pro tio sin pravigas la nobla fervoro, kiun montras la Esperantistoj por propagandi sian lingvon, altrudante al si la plej senprofitajn kaj malavarajn oferojn, kun la antaŭsento ke ili faras grandan bonon al la homoj. Ili estu certaj pri nia vigla simpatio kaj pri nia voĉdono favora al la propono, kiun ili prezentis al la Internacia Libera Penso.

Las Dominicales. Madrid 3.2.1911.
PAUL LINARES. (Cordoba).

## La eklezio en Ameriko.

La eklezio en la nova mondo laŭcele kaj laŭskope iomete malsimilas la eklezion de la malnova mondo. Notu la raporton de la delegitoj al la kunveno de la episkopaj eklezianoj. Rigardate de la vidpunkto de la malnovmondulo ili sin okupas je demandoj ne strikte ekleziaj ĉar oni forte « rekomendis la malpliigon de la horoj de l'laboro por ke la individuo povu ĝui tiom da ripoztempo kiom estas postulata de vera socia vivo. Ili postulis unu tagon de ripozo ĉiusemajne por ĉiuj kiuj l a b o r a s kaj, krom tio, laŭtempan laborenspezon en ĉiu fako de industrio. La eklezio povas aliĝi nek kapitalistaron, nek laboristaron : ĉar ĝi devas esti kaj resti la eklezio por ĉiuj. Forte postulata estas ke la eklezio bonuzu sian influon favore de rajtoj de l'homo. Tute ne estas necese devigi homan labori dekdu horojn potage, dum sep tagoj posemajne ; nek por tiomete da laborenspezo necesigante la kunlaboron de la edzino kaj infanoj. La unua zorgo de kristanismo devas esti por ĉiam « kio utilas kaj utilos al la homo » nek « kio donas kaj donos la plej grandan monprofiton. Vera eklezio signomarkas kulto, sed kulto estas nek hebrea, nek kristana, nek nekredana ; sed vera kulto de la ĝishodiaŭa eklezio estas la k u l t o t u t h o m a. Perfekta eklezio sub ĝishodiaŭaj kondiĉoj devas kunlaboradi por ke la tuthomaro atingu la altegan celon kaj idealon de la plej progresinta homaro. »

B. F. S.

## Liberpensa Kroniko

LA SOCIETO FRANCISCO FERRER aperigis raporton aprobitan la 18-an de Decembro 1910, de la ĝenerala kunveno de siaj fondintoj. Ĝi estas kompleta resumo de la efika agado de la societo, kiu fondiĝis por morale venĝi la krimon kontraŭ la konscienclibereco sur la personon de Francisco Ferrer. La broŝuro enhavas bildon de la monumento Ferrer, kiun oni intencas inaŭguri en Bruselo, la 13 an de Oktobro 1911, la dua datreveno de la krimo.

La ĝenerala sekretario sendos ekzempleron de la raporto al ĉiuj personoj, kiuj deziras kunlabori al la efektivigo de la projekto, aŭ kiuj ne estus ricevintaj la publicaĵon, tial ke ili ne metis sian adreson en la listo de la monoferintoj. Ili nur sendu sian vizitkarton al la Sekretariejo : Avenue Milcamps, 75, Bruselo.

LA NACIA ASOCIO de l'Francaj Liberpensuloj prezentis en Parizo la 25-an de Decembro sian ĉiujaran feston, « La Homa Kristnasko » kun grandega sukceso : ĝi konsistis el muzika, poema, danca, teatra, kinematografa, ĉe kukmanĝa prezentado de la kristnaskaj festoj ĉe la diversaj nacioj, kun partopreno de l'infanoj kaj helpo de plej eminentaj geartistoj. Jen bela ekzemplo de inteligenta uzo kaj raciema interpretado de la religiaj legendoj.

## Libraro kaj gazetaro

INICILO MATEMATIKA. — Alvenis al ni kiel vere interesa pedagogia novaĵo la « Noto pri la Inicilo Matematika, de Jacques Camescasse». De la moderna pedagogia vidpunkto ĉiu instruo devas esti objekta ; la sistemo abstrakta (ellerni memore la regulojn en aritmetiko, algebro kaj geometrio) estas malutila, tiel malutila, ke, forgesinte la specialan regulon, la lernanto estas tute senhelpa ĉar li dependas de la memore lernita kaj neniam komprenita regulo. Froebel en siaj helpiloj en la patrina edukado, en la infanĝardo, multe laboris por la edukado matematika. Krom la multobla uzmaniero montrita en la verko la Inicilon Matematikan la edukisto povas bone utiligi en instruo pri desegnado, speciale en la instruo pri ombraĵitaj kaj neombraĵitaj linioj kaj korpoj. Certe estas tre rekomendinda edukilo. Havebla je 12 frankoj (Sm. 4.75). Ĉe Hachette & C$^{o}$., Paris, Francujo.

B. F. S.

* * *

Kial ne diri la tutan veron ? Nia kolego, « Espero Katolika », raportante pri Dro Zamenhof dum la Sesa kongreso mallongigis la paroladon kaj tute ellasis la frazon pri libereco, eklezio kaj senkulpaj suferantoj. Kial ? La tuta frazo, kiu ĝenis la katolikan gazeton estas jena : « Lando, » pri kiu revis kaj nun ankaŭ revas multaj suferantaj kaj » senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas. Regno de homoj, » kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al » ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas » feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ » dun kelka tempo vian liberan, de nenia monopolgitan » aeron ».

B. F. S.

## LA SOCIETO

NOVAJ ALIĜOJ.

S-ro Francis G. Morin, 831, Ewing st, Chicago, Illinois USA.
S-ro Slavko Jezic, ĉe S-no Kolonic, Bjelovar, Krizevački, Kroatujo.
S-ro Max Wiener, Dresden, 26, Germanujo.
F-no Suzanne Herrmann, 32, Tiergartenstr. Dresden, Germ.
F-no M. E. Jahns, 4, Reichstr. (P. Edelmann) » »
S-ro L. Bouvier, Farmaciisto, Del. de UEA, Poix, Somme Franc.
S-ro P. Mossmann, profesoro, Vesoul, Francujo.
S-no M. Hankel, 18, Nicolaistr., Dresden, Germ.
S-ro Fritz Adler, 14, Walpurgisstr., Dresden A., Germ.
Eksiĝis : Sroj J. Verbraecken, L. Verbraecken.
Entute kun la nova honormembro : 154 anoj.

HONORMENBRO. — La fama Pola Liberpensa verkisto, kies « Kateĥismon » ni publikigis en la bulteno, Andrzej. Niemojewski, akceptis esti Honormembro de nia Societo, dank'al klopodoj de nia agema ano Sandecki.

AVERTO. — Ne plu prokrastu la jam malfruan pagon de la Kotizaĝo por la nuna societa jaro 1910-1911. Aldonu F. 0.10 (Sm. 0.04) por la imposto pagota de l'ricevanto.

**APEROS en la proksima numero : raporto de nia samideano Morton pri la « American Secular Union ».**

**DEZIRAS KORESPONDI kun hispanaj, portugalaj kaj amerikaj liberpensuloj : A. M. NISĈENKOV, Pokrovskaja nagoran, n° 10, Saratov (Rusujo .**

**DEZIRAS KORESPONDI kun liberpensuloj : DANI TOGARMA, Rostov Don. (Rusujo).**

## Notinda Sukceso

Sekve de laŭdindaj klopodoj de nia agema societano Ettore Fasce, la politika ĉiutaga gazeto « Il Lavoro », Genova, decidis enpresi Esperantan rubrikon, kiun ĝi komencis en sia numero de 12/2/11, prezentante al siaj legantoj la belan salutparolon, kiun samideano Fasce adresis al la ĉeestantoj de la unua Esperantista kongreso de la Italaj Esperantistoj (Bordighera). Ni gratulas nian samcelanon Fasce pro la obtenita sukceso kaj certe ni devas esprimi nian koran dankon al la administrantaro de « Il Lavoro », la unua gazeto ĉiutaga en Italujo, kiu tiel efike helpas nian movadon.

El ĉiuj landoj ni sendu gratulojn al « Il Lavoro » ! !

S.

# El Strindberĝ'a Novelo

Ekzistas certa falsiganto kun torĉo en la mano, anĝelo, kiu iradas kun korbo da rozoj dissemante ilin sur la abismojn en la vivo; estas anĝelo de l'mensogo, kaj ĝia nomo estas « La Belo »! La paganoj adoris ĝin en Grekujo; la princoj ornamis ĝin per honoregoj, ĝi sugestis la popolon tiel, ke tiu ĉi ne vidis la faktojn tiaj, kiaj ili estas.

Ĝi iradas senĉese dum la tuta vivo kaj falsas! Kial, vi militistoj, kial vi vestigas per ornamitaj vestaĵoj kun oro kaj brilantaj koloroj? Kial vi ĉiam laboras sub muziko kaj flirtantaj flagoj? Ĉu ne pro la celo, kaŝi tion, kiu kuŝas interne je via metio?

Se vi amus la veron, vi devus iri en blankaj ĉemizbluzoj kvazaŭ buĉistoj tiel, ke la sangmakuloj klare vidiĝas; vi devus iri kun tranĉilo kaj ostrompilo kiel la viandpecigistoj en la buĉejo, kun hakiloj gutumantaj je sango kaj gluaĵaj pro sebo! Anstataŭ muzikistaron vi devus peli antaŭ vi aron da blekegantaj homoj, homoj, kiuj freneziĝis pro la aspektoj sur la batalkampo; anstataŭ flagojn vi devus porti envolvilojn por mortintoj kaj sur la armea veturilaro transporti ĉerkojn!

August Strindberg, el « Konscienctúrmento ».
El sveda lingvo tradukis O. B.

# KASO

NOVEMBRO 1910.

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | F. 31.75 |
| Kotizaĵoj : | Büneman P. | 3.75 |
| | Schlatt | 2.40 |
| | Tomljanoviĉ | 2.40 |
| Presaĵoj : | de Bruijn | 1.20 |
| | | F. 41.50 |
| Elspezoj : | Preso de Aŭg. Bulteno | F. 21.— |
| | Poŝtmarkoj | 2.50 |
| | Dogankosto | 1.55 |
| | | F. 25.05 |
| | En kaso | 16.45 |

DECEMBRO 1910.

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | F. 16.45 |
| | Abonoj de F. W. & H. Shaw, Strong, (British E. A.) | 6.80 |
| Kotizaĵoj : | Hinglais | 2.50 |
| | Cornet | 3.00 |
| | Fridrich | 2.50 |
| | Chyla | F. 2.50 |
| | Devĉic | 2.40 |
| | Libal | 2.40 |
| | Linares | 2.50 |
| | Diaz Lopez | 2.50 |
| | Perros | 2.50 |
| | | F. 46.05 |
| Elspezoj : | Poŝtmarkoj | 3.— |
| | Intern. Federacio : Kotizaĵo | 15.— |
| | | F. 18.— |
| | En kaso | F. 28.05 |

JANUARO 1911.

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | F. 28.05 |
| Kotizaĵoj : | Guillemin, Guarro Vilardell | 7.50 |
| | Soriano | 2.50 |
| | Jezic | 2.40 |
| | Priou | 2.50 |
| | Schubert, Kurz, Morin | 15.45 |
| | Bourlet (2 j. & donaco | 10.00 |
| Abono : | Pafomov | 2.00 |
| | | F. 70.40 |
| | En kaso | F. 70.40 |

FEBRUARO 1911.

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | F. 70.40 |
| Kotizaĵoj : | Wiemer, Hermann, Jahns | 7.25 |
| | Olshausen | 2.50 |
| | Bouvier | 2.50 |
| | Sandeckl | 2.90 |
| | Uitterdyck (2 j.) | 4.90 |
| | S-ino Hankel | 2.40 |
| | Adler | 2.35 |
| | Chevalier, Jacobs Van Dessel, Van Dessel, Dollez | 12.50 |
| | | F. 111.95 |
| Elspezoj : | Poŝtmarkoj | F. 2.— |
| | Preso de la Raporto | 12.50 |
| | Sendkostoj | 2.50 |
| | Preso de Societa Reg. | 4.— |
| | Bulteno Sept. Okt. | 18.— |
| | Sendkostoj | 11.— |
| | Bulteno Nov. Dec. | 18.— |
| | Sendkostoj | 7.— |
| | Bulteno Jan. Feb. | 18.— |
| | Kovertoj k. c. | 5.— |
| | | F. 98.— |

En kaso : F. 13.95 (Sm. 4 34)

Presejo Esperantista ; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

Jaro 1910-1911. — No 9. Majo 1911.

## BULTENO de
# ★ LIBERA PENSO ★

**Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj**
Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

Sekretario-kasisto de la Societo : R. DESHAYS, Sens, Francujo.
Administrejo de la Bulteno : Kl. Beerstr., 45, Antwerpen.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn kaj artikolojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions, Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

## LA FINO DE L'KRISTANISMO EN FRANCLANDO

J. TANNERY.

Tiu ĉi artikolo estas eltirita el Pensoj de la fama matematikisto kaj filozofo JULES TANNERY, publikigitaj post lia morto, kiu okazis en Parizo la 11-an de Novembro 1910.

Ĝi certe ne estas la unua religio, kiun la tempo forsorbis. La paganismo estis, en la klasoj plej inteligentaj, ruinigata per la atakoj de la filozofoj, kaj ĉie forputriĝis, kiam la kristanismo komencis enfiltriĝi en la antikvan societon.

Oni ne bone vidas, kio estas komuna inter tiu situacio kaj la nia : aliparte kial la katolikismo mortus de la sama malsano, de la sama morto, kiel la paganismo? Jen, unue jam, fundamenta diferenco : la paganismo estis fine eksterordinaire malfermiĝinta kaj pligrandiĝinta : ĉiuj dioj estis sin miksintaj en ĝin, kaj la antikva roma kulto malaperis sub la amaso de la grekaj, aziaj, bàrbaraj ritoj; kontraŭe la katolikismo pli kaj pli fermiĝas, ĝi sufokiĝos en la malvasta korto, kiun ĝi konstruis al si, kaj en kiu ĝi pretendas sin defendi kontraŭ la furiozaj atakoj de l' racio kaj de l'scienco.

Ĉar ne plu kun la racio havanta nur siajn proprajn. fortojn kun la filozofio, kun la prudento batalas la kristanismo, sed plie kun la racio helpata de la sperto, kun la scienco. La filozofio dum la lasta jarcento, estis ĝin forte batinta; la scienco, kiu jam detruis la antikvan ideon pri l'universo, la kreadon. la miraklojn, la Providenco, ĝin mortigos. Estas vere, ke ĝi povas aparteni nur al malgranda nombro da privilegiuloj, sed ĉitiuj vana penos teni fermitaj siajn manojn plenajn de veraĵoj, kiuj filtriĝas tra iliaj premataj fingroj kaj ĉien disfluas : kvankam strange komprenataj, kvankam surprizinde difektataj, ili ne malpli terure disbatas la malnovajn doktrinojn. Anstataŭ cedi iom post iom, sin modifi laŭ la ŝanĝoj malrapide okazintaj en la scienca interpretado de la mondo, en la grada evoluo de la socio, la katolikismo obstinis en la supernaturaĵo kaj en la ekscesa reakcio : la absurdaĵoj havas sian logikon, kiu estas fariĝi ĉiam pli absurdaj, ĝis la tago de sia defalo. Nenia interpaco estas jam ebla inter ambaŭ partioj, kaj la rezultato de l'batalo ne estas duba : ĉu oni ĉagreniĝas, ĉu oni ĝojas pro tio, de hodiaŭ la kredo foriĝas, la preĝejoj malpleniĝas; la maniero mem per kiu oni bruege paradigas kelkajn restantajn fidelulojn, montras la maltrankvilecon, kiun oni havas.

Estas bone, unue, atenti, ke la katolikismo estos anstataŭata, en Franclando, de nenia alia religio : la pretendo, kiun ĝi proklamas, esti la absoluta vero, estas kredeble la plej forta motivo de tio : oni devus ĝin kompari kun la podio de kolono, de kiu oni ne malsupreniras, sed falas : neeble halti duonvoje, nenio ĉe kio oni povus alkroĉiĝi. Tiuj kiuj, en la sincereco de iliaj pripensoj, ne pro malseriozeco nek por sin liberigi de morala disciplino, kiun ili plu respektas, forlasis la katolikismon, konservas plej ofte nenian pozitivan kredon.

Oni ne vidas plibone, ke la protestantismo progresus : duone sufokita en sango je sia naskiĝo, longatempe persekutita, ĝi konservas, ne antaŭen paŝante, lokon kare akiritan. La provoj faritaj aŭ farotaj por starigi novan kulton estas ja falontaj sub la ridoj : jam sufiĉe pene estas kredigi la miraklojn fabrikatajn je la nomo de l' katolikismo, por malinciti trudi miraklojn alimaniere. Iuj tamen pretendis agi sen la supernaturaĵo kaj sin apogi nur sur la scienco : ĉu ili forgesis, ke la fundamenta celo de la Religio estas la mistero, kiu kaŝiĝas sub la vidataĵoj, sub la fenomenoj; ĉu ili forgesis, ke la scienco pristudas nur tiujn solajn fenomenojn, ke ĝi nin instruas neniel pri la Estaĵo, kies elmontroj ili estas, kaj sin okupas pri ĝi nur por rompi preterpasante la precizajn formojn, sub kiuj la religioj penis komprenigi

pri liberigo de la homaro el la katenoj de pastraro.

Senpera kaŭzinto de la kondamno estis espiskopo de Wlodawek, pastro Zozitowiecki, kiu denuncis lin. Tiu episkopo estas ebla postuelo de Varsovia Ĉefepiskopo Vincento Chosciak-Popiel, kiu nune estas mortanta.

FR. SANDECKI.

---

EN FRANCLANDO. — VIKTIMO DE LA ESPRIMLIBERECO. — Jus mortis 37 jara en Parizo, pro malsano rapide gravigita en malliberejo, la admirinda desegnisto D e l a n n o y (Dlanŭa). El neriĉa familio, li eniris en la Belartan Lernejon kaj intencis fariĝi pentristo ; sed, june edzo kaj patro, li devis unue por vivi, praktiki la desegnarton. Forta kaj impresiga artisto, sincera kaj kuraĝa karaktero, li liveris satirajn desegnojn, tuj tre famajn, al la gazetoj « La Guerre Sociale » (Socia milito), « Les Hommes du Jour » (La Nuntagaj Homoj), « L'Assiette au Beurre » (La Butertelero, t. e. la profitfonto, al kiu sin vete puŝas la politikuloj).

La ministro Clémenceau, atakita mem, atendis por sin venĝi desegnon kontraŭŝovinisman, kiun Esperantistoj kredeble ne malaprobus : ĝi prezentis Generalon D'Amade, la Marokan heroon, kun ruĝaj manoj kaj buĉista antaŭtuko. Delannoy estis kondamnata je unu jaro da mallibereco. En karcero li rapide malvigliĝis, kaj la tuberklozo lin tiel terure frapis, ke oni devis lin eligi.

Dum du jaroj li duone viva ankoraŭ brave laboris, kaj fine mortis je la tempo kiam ankaŭ desegnistoj, Sagrista en Hispanujo, Hansi kaj Zislin en Alsaco, suferis sammotivajn punojn. Kaj en Francujo plue la granda artisto Grandjouan, pro desegno pri la morto de Delannoy, nun estas persekutata. Silentadas la granda gazetaro, servanto de l' monaj potencoj.

Tiaj atencoj pruvas, ke la pensa libereco estas tiel necesega ĉe arto, kiel ĉe literaturo, kaj ke nuntempe ĝi devas defendiĝi sur la politika, precipe socia kampo, eble eĉ pli utile, ol sur la religia.

R. D.

---

PETERBURGO. — N. P. Evstifejeff. Akademiano, Lingvokomitatano, Honora membro de la Rumana Esperantista Societo, vicprezidanto de l' Ruslanda Esperantista Ligo, prezidanto de la studenta Universitata grupo, konsulo por la junuloj (U. E. A.), k.t.p. ; sciigas ĉiujn siajn korespondantojn, ke al konstantaj kaŭzoj de lia neakurateco pri korespondado (ŝanĝemo de l'adreso, malakurateco de l' poŝto, manko de l' tempo k.t.p.), aliĝis ankoraŭ nova, tre grava kaŭzo : dum la nokto de 1911 (23-24) Aprilo, en lia loĝejo okazis polica serĉado kaj ĉiuj skribaĵoj kaj fotografaĵoj, trovitaj ĉe li, estas forprenitaj. Tiun malfeliĉon kaj humiligantan ofendon li dividas kun multaj samurbaj samideanoj, kaj tio malebligas al li eĉ revi pri akurata korespondado. Alilandaj samideanoj bonvolu atenti la kondiĉojn de vivo de ruslandaj Esperantistoj kaj, ne tro rapide kondamni ilin pro ilia malakurateco. Kiam li ricevos sian arĥivon, li sammaniere sciigos pri tio.

La sama afero la saman nokton okazis en la loĝejo de jenaj Peterburgaj samideanoj, kaj en la Oficejo de Ruslanda Ligo Esperantista :

| | |
|---|---|
| 1 S-ro N. P. Evstifejeff | (*) 6 F-ino V. F. Barabanova |
| (*) 2 S-ro A. A. Postnikov | 7 F-no J. M. Zike |
| 3 S-ro H. B. Beringer | 8 S-ro Volkvysskij |
| 4 S-ro W. M. Zike | 9 F-ino A. N. Trapeznikova |
| (*) 5 S-ro Burkov | 10 F-ino K. N. Kosjankovska |

(*) Estis arestitaj krom tio.

# TOLSTOI

Kiam Leo Tolstoi forlasis la vivon, la mondo perdis plej eminentan pensulon, sentiman verkiston kaj tutmondan amikon de malriĉuloj kaj persekutatoj. Li senigis sin de l' komforta vivado kaj trapasis tre simplan vivmanieron inter kamparanoj. Siaj adiaŭaj vortoj al la filino estis la jenaj : « Kial do zorgi por mi mem, dum ke milionoj da kunhomoj suferadas ? »

Pro tio, ke liaj verkadoj kaj faradoj estis kontraŭ la reguloj de la kristanaj eklezioj, ili malpermesis al li la fin privilegion kaj honoron de la greka eklezio kies ano li estis. Sed, ĉu eklezio, ĉu ne, ĉu cermemonie, ĉu ne, la senmakula animo de tiu ĉi eminentulo, glorigata kaj benata per vera vivado, transiris la sojlon de la porĉiama pacujo. Memoru, ke li estis fevora amiko de nia afero !

B.P.S.

# LA SOCIETO

NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Louis F. Newcomb, Trancontinental railway, Cochrane (Ontario) Kanadujo.

S-ro P. Belikov, kontoro Br. Kononoviĥ, Pĵatsk, Smolensk, gub., Ruslando.

S-ro Otto Amon, Kolosvar, Hugarujo.

S-ro L. Lorek, Vinkovci, Kroatujo.

S-ro I. Pesiĉ, — —

S-ro E. Beer, — —

S-ro J. Wilford Davis, 304-16 th str., S. E., Washington, Usono.

HONORA MEMBRO S-ro Fernando Lozano, Apartado 109, Madrid, Hispanujo.

Entute : 181 membroj.

KASO

## MAJO 1911

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj : | Reportite | 85.75 |
| Kotizaĵoj : Stromboli | | 2.50 |
| Newcomb | | 2.50 |
| Amon | | 2.40 |
| Engst | | 2.90 |
| Davis | | 2 50 |
| Lorek, Pesiĉ, Beer, kun donaco de Staniŝiĉ | | 10.90 |
| Linares por ĉiamamembreco kun donaco | | 100 00 |
| Por specimeno | | 0.40 |
| Monoferado por la liter. konkurso | | 6.50 |
| | Sume | 216.35 |
| Elspezoj : | | |
| Preso de l' bulteno 7-8 | | 36.— |
| Sendo — | | 20.— |
| Kovertoj, koresp. en Antwerpen | | 2.— |
| | Sume | 58.— |

En kaso : Fr. 158.35. (Sm. 62.70).

Presejo Esperantista ; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.

JARO 1910-1911. — No 10. KONGRESA NUMERO AUGUSTO 1911.

# BULTENO de ★ LIBERA PENSO ★

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARKOTIZO KUN LA MONATA BULTENO : 1 SM (FR. 2.50)

SEKRETARIO KASISTO DE LA SOCIETO : R. DESHAYS, SENS, FRANCUJO.
ADMINISTREJO DE LA BULTENO : KL. BEERSTR., 45, ANTWERPEN.

Amerikaj membroj bonvolu sendi kotizaĵojn ka artikolojn al S-ro B. F. Schubert, Bureau of Pensions Washington D. C. Usono. Kotizmono kun bulteno : 50 c. = 1 Sm.

## Al la Kongresanoj !

Karaj kunkongresanoj !

Al vi ni dediĉas hodiaŭ nian bultenon de L I B E R A PENSO ; vin ja ni volas mi ne diras instrui aŭ eĉ allogi, sed igi pensi t u t e l i b e r e pri nia ne ĉiam ĝuste konata celado.

Neniel timu ! Ne al glavo de l'sangaj ribeloj ni tiras la homan familion, ne al ĉiuj detruemaj neoj ni alvokas korojn esperplenajn ; male, ni estas tiuj, kiuj entreprenis gardi kontraŭ perforto ĉiun ajn sinceran opinion.

Nia devizo « LIBERA PENSO » jam diras, ke ni volas fosi la kampon por libera pensado, pensado libera de ĉiuj d o g m o j, de ĉiuj tradiciaj kaj komunuzaj a n t a ŭ j u ĝ o j, de ĉiu aŭditoritata influo.

Ne per dognoj ni volas anstataŭi dogmojn, sed per individua libera pensado sur la bazo de la praktika vivo kaj de la sincera scienco studado.

Ni estas certaj — kaj vi ĉiuj devas konsenti al tio — ke nia laborado instigos la sendependan pensadon, la sinceremon kaj la respekton por la aliaj.

Ni estas plene konvinkitaj, ke nia laborado estas plej grava kulturhelpilo kaj ke ĝi portas la benon de ĉiuj grandaj homoj, kiuj suferante pro siaj ideoj, plantis la plej belajn kaj fruktodonajn idealojn en la homajn korojn, kiel ekzemple Konfucio, Budho, Sokrato, Kristo kaj aliaj.

Sincereco en si mem ; respekto por la aliaj, jen estas niaj gvidiloj. La respekto estas la fundamento de ĉiu liberamo. Ami s i a n liberecon, tio certe ne bezonas esti konsilata ; eĉ multaj ĝin amas tiom, ke ne restas plu al ili ero da amo por la libereco de l'aliaj. La vera, malfacila virto de l'pensulo estas, tiel pure ami sian ideon, tiom profunde ĝin fidi ke li ruĝiĝus uzi, por ĝin admirigi, ion alian ol ĝian luman belecon, kaj malatiĝi al minacoj de la forto aŭ delogo de l'profitoj.

Venu do al ni, ĉiuj koroj sinceraj kaj delikataj conscienco j !

Nia societo « L I B E R A P E N S O » — fondita en Cambridge (Aŭg. 1907) kaj regule organizita en Dresden - nun enhavas preskaŭ 200 membrojn, inter kiuj plej respektataj nomoj el la Esperantistaro kaj el la grandaj kulturaj nacioj. Jam pligrandigita, nia modesta bulteno kreskos kun niaj rimedoj ankoraŭ ne fortaj ; ĉar ĉiu ano kotizas jare nur Sm. 1.00. Sed ni fidas, por rapidigi nian prosperecon, la noblan altiron de nia bela celo.

Nune ni kore vin invitas, karaj kunkongresanoj, al akcepto ĉe niaj Antverpenaj amikoj :

Merkredon, la 23an de aŭgusto, vespere je la 8a en « Antwerpsch Koffiehuis, » Van Straelenstraat 6.

## LIBERA PENSO ĈE LA SEPA KONGRESO UNIVERSALA DE ESPERANTO

### NIAJ ĜENERALAJ KUNVENOJ.

La societo « LIBERA PENSO » havos du ĝeneralajn kunvenojn, kiuj okazos merkredon la 23an je la 10 1/2a, kaj ĵaŭdon, la 24 an je la 5a, en speciala salono de la Reĝa Ateneo (Akceptejo),

Ĉiuj niaj membroj estas i n s i s t e petataj ĉeesti tiujn kunsidojn, kies tagordo estas plej grava.

TAGORDO.

Laŭ la artikolo 17-a de nia regularo, skriba voĉdono post konsiliĝo en ĝenerala kunveno estas necesa por ŝanĝoj en la regularo : instruita per la antaŭaj ĝeneralaj (ironie tiel nomitaj) kunvenoj, kaj kvankam certe ĉitiu estos dece multenombra, la estraro de la Societo juĝis justa kaj oportuna apliki tiun regulon al ĉiuj decidoj prenotaj ĉe la kunveno kaj al la baloto de la komitatanoj.

Jam du proponoj estas prezentitaj por la tagordo :

1-e De So O. Bünemann, por interŝango de propagandiloj kun la internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj.

2-e De Dro Uhlmann, por ke la Esperantista Fako

» estas Francujo kun 49 anoj, Belgujo 25, Germanujo 20, » Usono 15, Bohemujo kun Moravio 11, Hispanujo 9, » Svisujo 8.

» La financa stato, kontrolebla laŭ la monataj kaskontoj, » kaj sur la jena kaslibro, estas kontentiga, kvankam ĉirkaŭe 20 anoj, malgraŭ averto, ne sendis tiujaran kotizaĵon. » Restis al ni finjulie Fr. 246,95 (Sm 97,78). Tial ni povas » ne tro ŝpari propagandajn elspezojn ĉe la nuna kongreso.

» Tiel nia societo povas espere regardi antaŭen, kaj fidi, » ke baldaŭ ĝi sukcesos samtempe enplanti Esperanton en » la universalan liberpensulan kampon (Universala kon- » greso de la Libera Penso en München 1912) kaj preni » ŝatindan lokon inter la esperantistaj societoj kaj ĉe nia gazetaro. R. Deshays ».

La raporto estas akceptata. Du elektitaj ĉeestantoj kontrolas la kaslibron haj ĝin deklaris ĝusta.

La kunvenintaro konsentas decidi nur provizorajn proponojn submetotajn al skriba voĉdonado, kaj komencas la tagordon.

1. — Pri interŝanĝo de propagandiloj kun la Esperantistaj Vegetaranoj S-roj STROELE kaj WEISZ konsentas ; S-ro WOLF ĝeneraligas la decidon okaze por ĉiuj societoj, kies principoj ne kontraŭstaras la niajn. Unuvoĉe aprobita.

2. — Pri la peto de Dro Uhlmann, por ke la Esperantista Fako de la Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo (kies cirkuleron oni relegu en Kongresa Numero) uzu la bultenon de LIBERA PENSO kiel oficialan organon : post diskuto kaj serĉado de solvo por la financaj malfacilaĵoj, laŭ opinio de S-ro STROELE, estas proponate, ke la membroj de la Esperantista Fako de tiu Ordeno kotizu kiel membroj de LIBERA PENSO, kaj ricevu en la bulteno lokon proporcian al ilia nombro.

3. — Pri propono de S-ro Bünemann, por ke la societa jaro komencu Januare, unue esprimiĝas malkonsentoj, kaj post diskuto oni alprenas proponon por plilongigo de la nuna jaro ĝis Januaro sen postulo de plia pago : Januare 1912 komencus la sekvanta jaro. Ĉiujare la skriba voĉdono okupos proksimume la tri aŭ kvar monatojn post la kunveno.

4. — Por elekto kiel novaj komitatanoj pro statuta eliro de F-ino FRYER kaj Dro BATEK, proponiĝas : Komitatanoj S-roj STROMBOLI kaj FRIDRICH ; rezervaj komitatanoj F-ino FRYER kaj Dro BATEK.

5. — Post plenumo de la tagordo, S-ro MORTON alportas al la societo fratajn salutojn de la liberpensuloj el Usono. Jam delegita de l' Usonaj societoj ĉe la Monisma Kongreso en Hamburgo (Septembre), li estas elektita kiel delegito de LIBERA PENSO ĉe la sama Kongreso, kun S-ro O. BUNEMANN (kiu malfeliĉe estas nun malsana) kaj S-ro BOURLET (kiu ne veteris Hamburgon).

6. — S-ro SALOMON antwerpenano postulas bultenon pli facile kompreneblan por la komencantoj.

7. — La loko de la venonta Ĝenerala Kunveno povos esti ĉu Krakovo, sidejo de la Oka Kongreso de Esperanto, ĉu Munĥeno, sidejo de la Universala kongreso de la Liberpensuloj ; la sekretario memorigas, ke tie ni devos klopodi por la rezultato de nia propono resendita de la Brusela Kongreso al Komisiono. Unuvoĉe oni proponas, ke la Ĝenerala Kunveno okazu en Krakovo, kaj ke Delegitaro ĉeestu en Munĥeno la Liberpensan Kongreson. En Krakovo klopodos por ni Societano ROSENSTOCK, el la Kongresa Komitato, kaj en Munĥen Societano Dro YVANSKI.

8. — S-ro STROMBOLI proponas kiel Honormembron la faman Italan Liberpensulon GHISLERI : unuvoĉe akceptite.

9. — S-ro WEISZ petas forstreki el la regularo la donaculojn membrojn : akceptite.

La skriba voĉdonado fariĝos PER BULTENOJ ĈIKUNE SENDITAJ, ĝis la UNUA DE NOVEMBRO. La elektotaj komitatanoj ekfunkcios de la I-a de Januaro dum la jaro 1912, se tiu ŝanĝo estos aprobita.

---

# La Olivarba Monto.

## de ALFRED de VIGNY (1799-1863).

I.

Jen sola tra nokto Jesuo iradis :
Li blanke vestita similis mortinton ;
Kaj liaj disciploj dormadis malsupre
Ĉe la olivarboj de vento batataj :
Jesuo paŝadas, tutsame tremanta,
Kun morta malĝojo, mallumaj okuloj,
Kun frunto klinata kaj brakoj plektitaj,
Ŝajnante ŝtelisto kaŝanta rabaĵon ;
Ŝtonaron li konas pli bone ol vojon,
Kaj en Gethsemani subite li haltas.
Li genufleksinte, kun frunto ĉe l' tero,
Ĉielon rigardas vokante : « Ho Patro ! »
— Ne lumas ĉielo, kaj Dio silentas.

Mirante li staras, reiras paŝege,
Puŝante la branĉojn en vento. Frostanta
Sangŝvito gutete defluas de l' kapo.
Li paŝas malsupren, kaj krias timege :
« Ĉu vi ne alvenos por preĝi maldorme ? »
Sed morta dormado premegas disciplojn.
Eĉ Petro al voĉo de l' Majstro surdiĝis.
Do supren la Filo de l' Homo reiras ;
Kaj kiel Egipta paŝtisto, ĉielen
Li serĉas anĝelon en stelo brilantan.
Sed nubo funebra, vidvina vualo,
Ĉirkaŭe per faldoj kovradas dezerton.
Nun rememorante la longajn suferojn
De tridek tri jaroj, Jesuo homiĝis,
Kaj koron mortulan ekvenkis timego.
Li frostis. Kaj vane trifoje li vokis :
« Ho patro ! » Nur vento respondis al krioj.
Li falis sur sablon sidiĝe ; malĝojo
Lin home pri mondo kaj home pensigis.
— Kaj tremis la tero : ĝi sentis pezege
Falantan Savonton sub Mano Kreinta.

II.

Kaj diris Jesuo : « Plu vivi min lasu,
Ho Patro ! Ne fermu tro frue la libron !
Ĉu vi nun ne sentas tutmondon, homrason
Kun mi suferantan je karno tremanta ?
Ĉar timas la Tero vidvine soliĝi,
Sen tiu diranta la novan parolon,
Kaj ĝia dolora deziro ricevis
Nur unu Divorton, el buŝo la mia :
Sed estis la vorto kun tia dolĉeco
Ke mi ebriigis la genton homaran
Per guto de vivo kaj forto dieca.
Kun brakoj tendataj dirante : « Frateco ».

Ho Patro, se pene mi faris la taskon,
Se dion mi kaŝis sub formo saĝula,
De l' homa ofero se prezon mi ŝanĝis,
Anstataŭ la korpojn prenante spiritojn,
El ĉio tirante simbolon idean,
El lukto parolon, el oro moneron,
El ruĝa sangondo la brilan vinfluon,
El membroj de l' karno la macon blankegan ;
Se mi dupartigis la tempojn, jen sklavaj,
Jen poste liberaj, kaj savas Estinton,
Mi petas de mia korpsango dolora
Ni verŝu duonon por lavi Estonton !
Ho Patro savonta, tuj ĵetu, antaŭe,
Duonon de tiu senkulpa korsango
Sur kapon de l' homoj venontaj dirante :
« Ni povas por ĉiuj mortigi justulon ».
Jes iam — ni scias — je l' aĝoj venontaj
Maldolĉaj tiranoj kun kvazaŭsaĝuloj
Konfuzos animojn de ĉiu nacio
Falsante la sencon de la Reaĉeto.
Ho ve ! mi parolas : jam mia parolo
Venene ŝanĝiĝas en la parabolaj.
Forigu ĉitiun kalikon, amaran
Ja pli ol absinto kaj akvoj de l' maro.
La vergoj venontaj kaj krono kun dornoj,
La najloj ĉe manoj, la lanco en bruston,
Kaj tuta la kruco atende staranta
Ne tiom min Patro, ne tiom timigas !
La Dioj bonvole falantaj sur mondojn
Postlasu en ili nur signojn profundajn ;
Kaj se mi surpaŝis la globon mankplenan,
De kiu senĉese la ĝemo min vokis,
Ĝi estis por lasi post mi du Anĝelojn,
De kiuj paŝsignojn kisados la homoj,
Certecon feliĉan kaj fidan Esperon,
La paron ĉielan kun ambaŭ ridetoj.
Sed mi tuj ĝin lasos, la teron mizeran,
Nur iom levinte la nigran mantelon
Ĝin larĝe kovrantan per faldoj fatalaj,
Tenatan de l' Dubo kaj de la Malbono.
Malbono kaj Dubo per vorto disfalus.
Vi ilin antaŭe sciadis, permesis :
Ha lasu, ke mi vin absolvu : ĉar tia
Akuzo el ĉie premadas kreiton !
Sur sian stombŝtonon tuj staru Lazaro :
La mortan sekreton li fine ellasu.
Ni lin memorigu pri ĉio vidita,
Li diru ! — Nu kio estadas, finiĝos,
Sur kio Sinjoro konstruis Naturon,
Kaj kion al ĉio ĝi donas, aŭ prenas,
Kaj kiel ĝi mute ĉielen parolas,
Kun kia amego kaj ĉastaj kuniĝoj ;
Kaj kiel ja ĉio disiĝas, revivas,
Kaj kial kaŝiĝo kaj kial aperoj ;
Ĉu astroj ĉielaj laŭvice provataj,
Simile al tiu, kulpiĝas, saviĝas ;
Ĉu tero por ili aŭ ili por tero ;
Ĉu vero ĉe fabloj, ĉu lumas mistero,
Scienco nescias, malpravas racio ;
Kaj kial animo en ĉenoj sopiras ;
Kaj kial neniu mezema vojeto,
Nur vojo enua de l' paca fiĝojo
Kaj vojo rabia de l' akraj pasioj,
Nur la letargio kaj la konvulsioj ;
Kaj kial la Morto minace pendadas,
Kaj tremas Naturo sub glavo frapema ;
Ĉu justo kaj bono, maljusto, malbono
Nur estas flankaĵoj en cirklo fatala,
Aŭ de l' Universo mem ambaŭ polusoj,
Portantaj ĉielon kaj teron sur ŝultroj ;
Kaj kial Spiritoj Malbonaj triumfas
Dum virto suferas kaj mortas infanoj ;
Nacioj ĉu estas virinoj gvidataj
Per ora stelaro de l' diaj ideoj,
Aŭ stultaj knabinoj sen lampoj en nokto,
Interfrapiĝante sen celo irantaj ;
Kaj dum la perea horloĝo de l' tempoj
Finverŝos la lastan de siaj sableroj,
Ĉu unu rigardo de viaj okuloj,
Ĉu mia korĝemo, ĉu signo de l' kruco
Malfermos la ungojn de l' Punoj eternaj,
Lasigos libera la homan kaptaĵon
— Ja ĉio klariĝos se scios la homo
De kie li venas kaj kien li iros ».

III.

Do tiel Difilo alpreĝis Dipatron.
Li ree sin klinas, atendas espere,
Sed supren reiras dirante: « La volo
La via, ne mia, fariĝu por ĉiam ».
Profunda teruro, timego senlima
Pliiĝas turmenton de l' agonianto:
Li longe rigardas, serĉadas senvide.
Marmore funebra ĉielo restadis;
La Tero sen heloj, sen astra radio,
Sen lumo anima, jam kiel ankoraŭ,
Fremadis. — Ĉe l' arboj li aŭdis paŝadon,
Kaj vidis ĉirkaŭe kun torĉo Judason.

SILENTADO.

Se vere, ĉe l' sankta Biblia ĝardeno,
La Filo de l' Homo parolis laŭ Skriboj,
Se blinda kaj surda por krioj de l' tero
Ĉielo nin lasis, abortan kreaĵon,
Justulo fiere malzorgos foreston,
Kaj de nun respondos per alta silento
Silenton eternan de l' muta Diaĵo.

Trad. R. Deshays.

# LA SOCIETO

F-ino Marie Meunier, I rue de Vernueil, SENONCHES (Eure & Loir) Francujo, kiu sub la nomo de sia frato S-ro Emile Meunier, fidela societano ĵus mortinta, sendis al LIBERA PENSO Fr 50, estas enskribita kiel ĉiama membro, kun koraj kondolencoj kaj dankoj de ni ĉiuj.

NOVAJ ALIĜOJ

S-ro E. Calvo, San Miguel, 146, Habana, Cuba.
S-ro E. Cros, I, rue de la Cloche d'Or, Perpignan, Franc.
S-ro J. Habert, 6 rue Edgard Quinet, Montrouge (Seine) Fr
Centro Instr. Republicano, 68 Atocha, Madrid, Hisp.
S-ro Roman Vogel, 5 st. szklana, Piotrkow, Pollando.
S-ro Casimiro Garcia, 4 str. Zapateria, La Arboleda. Vizcaja, Hispan.
S-ro Paŭlo Gottgetreu, 13 Rundestr. Hannover, German.
S-ro J. Erichsen. Sudebrarhupholm, Kreis Sleswig, German.
S-ro L.W. Colson, P.O. Box 489, Milan, Indiana, Usono.
F-ino J. E. Hamand, Schaller, Jowa, Usono.
S-ro Daniel Jones, 54 Robert st. Ynysybwl, Glam, Angl.
J. L. Bruyn, Prinsestraat 48, 's Gravenhag, Nederlando.
Antiklerikala Esp. Grupo, 61-12 Via del Colle (S° G. Rossi) Genova, Ital.
S-ro Gaston Barat, 6 boul. Louis XIV. Lille, Francujo.
S-ro Henry Meulen, 19 Boscombe rd, Shepherds bush, W London, Anglujo.
F-ino Adam, St Blaise près Neuchatel, Svisujo.
S-ro Antonin Jakeŝ, Nova ul. 19, C. Budejovice, Bohem.
S-ro H. A. Collot, 51, rue de la République, Arras, Francujo.
S-ro Lobbedez, 84 rue de Bapaume, Arras, Francujo.
F-ino E. Morawitz, Burgring 12, Graz, Aŭstrio.
F-ino Marianne Toldt, Brockmanns, 18, Graz, Aŭstrio.
S-ro Gustav Teltschik, Universitato 14, Graz, Aŭstr.
D-ro Wilhelm E. Dietl, Nibelungeng. 63, Graz. Aŭstrio.
S-ro Souchay, 134 Boul. Exelmans, Paris, Francujo.
S-ro Michele Arabeno, Salita Prione 27-4, Genova, Italujo.

Entute: 196 membroj.
Eksiĝis: Perceval, Wurmser, Ritz, Vaucher, Dublange

——

ŜANĜITAJ ADRESOJ.

S-ro F. Blangarin, 115, rue Manin, Paris, XIX^e^, Franc.
S-ro Kerr, 1135 Inca str., Denver, Colo. Usone.

——

LITERATURA KONKURSO. Monoferado, 3-a listo.

| | | |
|---|---|---|
| S-ro Schubert kaj F-ino Hamand | Fr | 5.— |
| S-ro Niedzwiedszki | | 0.60 |
| S-ro Redondo | | 1.— |
| F-ino Rouff | | 1.— |
| S-ro Raiczi | | 2.40 |
| S-ro Curchod | | 4.90 |
| | | 14.90 = Sm 5.90 |
| | | 2.60 |
| | | Sm 8.50 |

——

La staton de la societa kaso estos publikigata en la proksima numero de la bulteno.

**ANONCO.** — La Societanoj de Esperantista Antiklerikala Grupo en GENOVA (Italujo), Vojo S. Giuseppe 31/3, deziras korespondi Esperante kun Samideanoj Liberpensuloj de ĉia lando.

**LINGVO INTERNACIA**
CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
Eliranta inter la 15 kaj la 20 de ĉiu monato
— La Plej Malnova el Ĉiuj Gazetoj Esperantistaj —
Fondita en 1895
La Plej Enhavoriĉa! — La Plej Malkara!
48 PAĜOJ da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.
5 FR. (2 Sm.) Abonprezo por UNU JARO
Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respondkuponon
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Presejo Esperantista; J. B. Madou-Cop, Antwerpen.